# ?ilio kaj Peruo difinos sian novan maran landlimon.



La ministro pri eksteraj rilatoj de Peruo, Eda Rivas, informis ke la ministroj de sia lando kaj ?ilio kunsidos en la urbo Santiago de ?ilio por difini la landlimojn marajn inter amba? landoj.
Li esprimis ke en la kunsido nomata 2 plus 2 oni pritraktos la temon de la kartografio por realigi tiun difinon, sciinte ke la pasintan 27-an de januaro, la internacia kortumo de justico de Hago transdonis al Peruo parton de la pacifika maro kiu estis sub kontrolo de ?ilio.
La internacia kortumo difinis la maran landlimon, sed lasis al la du ?tatoj la respondecon starigi la precizajn koordinatojn de tiu limo. Tiamaniere, Peruo aldonos pli ol 50 mil km kvadratajn de mara spaco.
Rivas emfazis ke ne ekzistas konflikto inter amba? popoloj kaj ke la temo de la nomata tera triangulo havas neniun rilaton al la efektivigo de la verdikto de Hago.
Dum la renkonti?o oni anka? revizios la taskaron de la kunlaboro kaj fido establita inter la du landoj, sekve de la kompromisoj adoptitaj en la kunsido de la mekanismo, okazinta en Lima, la perua ?efurbo en la jaro 2013.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/13407-cilio-kaj-peruo-difinos-sian-novan-maran-landlimon

# Radio Habana Cuba